Triadobatrachus

Triadobatrachus ('triobla-rano') estas formortinta genro de rano-formaj amfibioj, inklude nur unu konatan specion, nome *Triadobatrachus massinoti*. Ĝi estas la plej antikva membro de la rana stirpo konata, kaj elstara ekzemplo de transira fosilio. Ili vivis dum la Komenca Triaso antaŭ ĉirkaŭ 250 milionoj da jaroj, en kio estas nune Madagaskaro.

Triadobatrachus massinoti, pra-rano el komenca Triaso de Madagaskaro.

Triadobatrachus estis 10 cm longa, kaj ankoraŭ retenis multajn praajn karakterojn, kiaj posedo de almenaŭ 26 vertebroj, kie modernaj ranoj havas nur kvar al naŭ. Almenaŭ 10 el tiuj vertebroj formis mallongan voston, kiun la animalo povis esti reteninta kiel plenkreskulo.[1] Ili probable naĝis per frapado de siaj malantaŭaj kruroj, kvankam ili ne povis salti, kiel plej modernaj ranoj faras. Ties kranio similis al tiuj de modernaj ranoj, konsista el ĵaluzio de fajnaj ostoj separataj de grandaj malfermaĵoj.[2]

Tiu animalo, aŭ iu parenco, evoluis finfine al modernaj ranoj, kies pli fruaj ekzemploj estis *Prosalirus*, milionoj de jaroj poste en Komenca Ĵurasio.[3]

Referencoj

1. ↑ (2016) "*Triadobatrachus massinoti*, the earliest known lissamphibian (Vertebrata: Tetrapoda) re-examined by µCT-Scan, and the evolution of trunk length in batrachians (http://repository.naturalis.nl/cgi/b/bib/bib-idx?c=naturalis;type=simple;view=reslist;fmt=long;rgn1=id;q1=oai%3AARNO%3A610011;lang=en;sort=year;cc=naturalis;page=reslist;size=1;start=1)", *Contributions to Zoology* **58** (2), p. 201–234.
2. ↑ (1999) Palmer, D.: *The Marshall Illustrated Encyclopedia of Dinosaurs and Prehistoric Animals*. London: Marshall Editions. ISBN 1-84028-152-9.
3. ↑ Rocek, Z.. (2000) "14. Mesozoic Amphibians", *Amphibian Biology. Paleontology: The Evolutionary History of Amphibians (http://rocek.gli.cas.cz/Reprints/AmphBiol3.pdf)* **4**. Surrey Beatty & Sons, p. 1295–1331. ISBN 0-949324-87-6.

Bibliografio

- Benes, Josef. Prehistoric Animals and Plants. paĝo 114. Prague: Artia, 1979.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Triadobatrachus&oldid=6101878"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:58, 5 feb. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.